

Ora Ĵurnalo

Numero 94, Aprilo 2026



La ponto de Älvsborg

Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo.....	2
Pri la frontbildo	2
Pri Ora Ĵurnalo.....	2
Espeporko meditas.....	3
Hajkoj ĉi-sezonaj.....	3
VIER BRILLEN (kvar okulvitroj) – la nacia orkestro de Hisingen.....	4
VIER BRILLEN (fyra par glasögon) – Hisingens nationalorkester	4
La Pramo al la insulo Hisingen.....	5
Hisingsfärjan.....	5
Haltigu la tempon por momento, <i>Helio Duarte</i>	9
Stanna tiden en liten stund, <i>Helio Duarte</i>	9
La fascino de la insulo Ringön, <i>Fredrik Viberg</i>	11
Venis letero de Manuela Blanco	12
Nova kontribuanto al Ora Ĵurnalo, Jindřiška Drahotová, Ĉeĥio.....	12

El Legaĵoj XVII de Jindřiška Drahotová:	
Mateno, kiu komenciĝas kun papilio.....	13
Kanto de malespera serĉanto.....	13
Praavino rakontas.....	14
Kiam iu demandas min	15
Estu feliĉa!	15
La plej feliĉaj homoj en la mondo.....	16
Världens lyckligaste folk.....	16
Kelke da nombroj, <i>Josef Kříž</i>	16
Ŝercoj por OĴ de Josef Kříž	17
Disŝiras la terglobo ŝtata lim', <i>Tatjana Auderskaja</i>	18
La telfero super Liseberg, <i>Helio Duarte</i>	18
Linbanan över Liseberg, <i>Helio Duarte</i>	18
Projekto Esperança Popokabaka	20
Kial Gronlando "apartenas" al Danio?, <i>Claude Rouget</i>	22
Skivojaĝo en Laponio, <i>Emelie Hultman</i>	23
Skidutflykt i Lapland, <i>Emelie Hultman</i>	23

Pri la frontbildo

La ponto de Älvsborg estis enaŭgurita en 8 novembro 1966. Ĝi streĉas super la rivero Göta älv, laŭ kies bordoj Gotenburgo havas sian havenon, kaj ligas la urbon kun la insulo Hisingen (kiu nuntempe apartenas al la urbo).

La ponto estas tute 900,6 metrojn longa kaj la spano ampleksas 417,6 metrojn. La pilonoj estas 107 m altaj kaj la libera alto por ŝipoj estas 45 metroj.

El Wikipedia

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@gmail.com. Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuaĵojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.

Ora Ĵurnalo n-ro 94 ankaŭ troviĝas en versio por la poŝtelefono ĉe www.esperanto-gbg.org/94



Espeporko meditas



- ☼ **Pasko** venas kun flavaj paskaj lilioj – simbolante esperon pri pli helaj tempoj.
- ☼ Jaron post jaro oni nomas la finnlandanojn **la plej feliĉa popolo** en la mondo – nun por la 9a fojo. Svedio estis numero kvar en 2025, sed nun numero kvin. Portoriko preterpasis nin.
- ☼ La ponto sur la unua paĝo nomiĝas Älvsborgsbron. Ĝi kunigas la grandan insulon **Hisingen** al la ĉeftero de Gotenburgo. Amuza muzikgrupo, *Vier Brillen*, kies membroj loĝas sur Hisingen, havas la fantazian ideon detruigi la pontojn kaj treni la insulon en la maron kaj fondi memstaran respublikon. Ne maltrafu aŭskulti ilin!
- ☼ Pli da kono pri la komunikiloj inter Hisingen kaj la gotenburga ĉeftero donas al ni Ingegerd, kaj **Fredrik Viberg** rakontas pri eksinsulo en tiu insulo. Bonvenon Fredrik kiel nova kontribuanto al nia magazino!
- ☼ Pri Gotenburgo – la iama kaj la nuna – ni povas lerni per **Helio Duarte** kaj Ingegerd Granat.
- ☼ Nova kontribuanto, **Jindřiška Drahotová** el Ĉeĥio eldonis la 100-paĝan libron

Legajoj, el kiu ni prenas ekz. sep etaĵojn, kiuj faras la homojn feliĉaj.

- ☼ La UN raportas ke la plej feliĉa popolo en la mondo estas la finnoj. Vi trovos la liston de la **10 plej feliĉaj popoloj** en ĉi tiu numero.
- ☼ La artikolo pri Liseberg, la populara amuzparks de Gotenburgo, havas interesajn bildojn pri **telfero**, kiu iam transportis homojn en Liseberg dum la jubilea ekspozicio 1923.
- ☼ Denove DR Kongo, pri kiu **Espoir Kasati** antaŭe raportis, estas en fokuso. Nun estas raporto de la revuo ELBB, Berlino.
- ☼ "Terglobon tenos Esperantoj" skribas **Tatjana Auderskaja** fine de poemo. Jes por esperantoj limoj inter landoj estas malŝatataj.
- ☼ Ni prenas artikolon el la revuo Norvega Esperantisto. **Claude Rouget**, ĝia redaktoro, kiu ankaŭ estas instruisto pri historio, klarigas kial Gronlando apartenas al Danio. Nova scio por multaj, ĉu ne?
- ☼ Fine ni ĝuas skivojaĝon en **Laponio**.
- ☼ Ĝis majoj! /Siv

Hajkoj ĉi-sezonaj

April' invitas
al suda land' kun revo...
esper' sin citas.



Ueyama masao 1970

Burĝonoj vivas
ĉe kverka stumpo, tie
memor' naivas.

Tomita tomu 1970

VIER BRILLEN (kvar okulvitroj) – la nacia orkestro de Hisingen VIER BRILLEN (fyra par glasögon) – Hisingens nationalorkester



Parolante pri la kovrilbildo de la ponto de Älvsborg...
Apropå omslagsbilden på Älvsborgsbron...

Ĉi tiu muzikgrupo ridigas la gotenburganojn per siaj frenezaj ideoj kaj sia ludema manipulado de blovinstrumentoj. Kvar el ili loĝas sur Hisingen, kiu estas parto de Gotenburgo, fakte granda insulo, kiu estas konektita per pontoj al la ĉeftero. Sur la kovrilfoto vi vidas unu el la plej longaj pontoj – Älvsborgsbron. La kvina membro loĝas pli norde, sed rajtas esti en la grupo "pro graco".

Ili nomas sin la Nacia Orkestro de Hisingen. Hisingen ne ĉiam ricevis la atenton, kiun ĝi meritas, kaj tial la grupo planas dekroĉi la grandan insulon de Gotenburgo kaj treni ĝin iom en la maron. Dungito de Göteborgs-Posten, Christian Wedel, respondecas pri la babilado inter kantoj.

Hisingen fariĝas nova respubliko kun mirinda orkestro kaj propra flago, kiel videblas en la bildo. Bovino ornamantas iliajn T-ĉemizojn, montrante, ke Hisingen iam estis agrikultura regiono. Nuntempe, ĉefe industrioj kiel Volvo kaj kelkaj pli-malpli fermitaj ŝipkonstruejoj karakterizas Hisingen. Mi vidis unu el la prezentadoj de la grupo ĉe Dergårdsteatern en Lerum lastjare kaj antaŭĝojas pri ilia sekva prezentado.

<https://www.youtube.com/watch?v=-OQfQ7rK44Y>

Den här musikgruppen får göteborgarna att skratta med sina galna idéer och sitt lekfulla hanterande av blåsinstrument. Fyra av dem bor på Hisingen, som är en del av Göteborg, egentligen en stor ö, som förbinds med broar till fastlandet. På omslagsbilden på första sidan ser du en av de längsta broarna – Älvsborgsbron. Den femte medlemmen bor längre norrut, men får "på nåder" vara med i gruppen.

Man kallar sig Hisingens Nationalorkester. Hisingen har väl inte alltid fått den uppmärksamhet den förtjänar och därför planerar gruppen att ta loss den stora ön från Göteborg och bogsera den en bit ut i havet. En medarbetare i Göteborgs-Posten, Christian Wedel, står för pratet mellan låtarna.

Hisingen blir en ny republik med en härlig orkester och egen flagga, som syns på bilden. En ko pryder deras T-shirts för att visa, att Hisingen förr var ett jordbruksområde. Numera är det framför allt industrier som Volvo och en del mer eller mindre nerlagda skeppsvarv, som präglar Hisingen.

Såg en av gruppens föreställningar på Dergårdsteatern i Lerum förra året och ser fram emot deras nästa framträdande.



”La avantaĝoj esti bona en la Gotenburga dialekto” (ĉe [youtube.com](https://www.youtube.com), ligilo en la antaŭa paĝo). Verŝajne ĉefe gotenburvanoj komprenas la dialektan prononcon, sed oni neniam scias...

Ĝuu! /Siv

”Nyttan av att vara bra på göteborgska” (på [youtube.com](https://www.youtube.com), länk på föregående sida). Det är väl främst göteborgare, som uppfattar det dialektala uttalet, men man vet aldrig...

Njut! /Siv

La Pramo al la insulo Hisingen – Hisingsfärjan

de Ingegerd Granat



La loĝantoj de Gotenburgo ĉiam deziris aŭ atingi Gotenburgon de Hisingen aŭ Hisingen de Gotenburgo. La malnova prama konekto inter Klippan kaj Färjenäs ĉe la Göta Älv navigis sur la rivero.

Människorna i Göteborg har alltid haft en strävan att antingen ta sig till Göteborg från Hisingen eller till Hisingen från Göteborg. Den gamla färjeförbindelsen mellan Klippan och Färjenäs på Göta Älv tuffade på i älven.

La unua pramo komencis funkcii sur la rivero jam komence de la 17-a jarcento, sed kiam la Ponto Älvsborg estis kompletigita, la pramo fariĝis malpli grava kaj fine estis tute fermita.

La pramoj havis amuzajn nomojn, kiuj aludas al la tempo, kiam ili aktivis, kiel ekzemple "Bonnafröjda" (la kampula ĝojo), "David Carnegie", "Hästefärjan" (la ĉevalpramo)...

Nun "Älvsrabben" (riverrapidulo) funkcias ĉi tie kaj ĝi estas ankaŭ agrabla maniero vojaĝi inter Gotenburgo kaj Hisingen.

Den första färjan började trafikera älven redan i början av 1600-talet men när Älvsborgsbron hade blivit färdig fick färjan mindre betydelse för att till slut läggas ned helt.

Färjorna har haft lustiga namn som anspelar på tiden de verkat i, t. ex. Bonnafröjda, David Carnegie, Hästefärjan ...

Nu trafikerar Älvsrabben här och det är också ett trevligt sätt att resa mellan Göteborg och Hisingen.



Vi eble scivolas, starante apud la malnova pramo de Hisingen, ĉu la loĝantoj de Hisingen same sopiras Gotenburgon? Sed persone, mi opinias, ke ili volas spekti la spektaklon de malproksime, eble kun taso da kafo en la proksima restoracio.

Tamen, oni povas diri rekte, ke tiu ĉi aparta konekto ne plu estas uzata. Do, oni devas kontentiĝi per vidi la Klippan-areon de malproksime, aŭ preni unu el la aliaj konektoj, kiuj estas uzataj. "Älvsborgsbron" estas proksime ĉiuokaze.

Man kan undra när man står vid den gamla hisingsfärjan om Hisingsborna längtar lika mycket till Göteborg? Men personligen tror jag att dom vill se spektaklet på avstånd, kanske med en kopp kaffe på det närliggande etablissemanget.

Man kan dock krasst konstatera att just denna förbindelse inte längre är i bruk. Så, man får nöja sig med att se Klippan-området på håll, eller ta sig till någon av de andra förbindelserna som är i bruk. Älvsborgsbron ligger nära i alla fall.



Iom pli bone prizorgata kaj moderna pramterminalo ĉe la Gotenburga flanko.
Ett lite mer välskött och modernt färjeställe på Göteborgssidan.

Sufiĉe nova maniero transiri la riveron videblas en la lastaj jaroj ruliĝanta sur la stratoj de Gotenburgo kaj ankaŭ flosanta sur la rivero. La loĝantoj de Gotenburgo havas senfinan deziron transiri la riveron al Hisingen. Novaj konektoj konstante konstruiĝas kaj ne nur tio, ankaŭ insuloj estas konstruataj por alproksimiĝi al la ĉarma insulo kun tiom da respektinda historio malantaŭ si.

Estas multaj vojoj, pontoj, tuneloj, pramoj, sed neniu telfero, kiu estis planita sed ne realigita. Ĝi restis, tiel diri, pendanta en la aero...

La Kapelo de Sankta Birgitta estas bela preĝejo situanta sur monteto apud la rivero. En ĉi tiu preĝejo, multaj ligoj estis faritaj pri kunvivado en malseka kaj seka vetero.

Ĉiuokaze, ĝi leviĝas potence super la ŝipaj kaj restoraciaj agadoj kaj aliaj eventoj, kiuj pulsas en la malnova industria areo.

Trankvila promenado en la areo povas allogi pli altajn pensojn. Multaj festadoj kaj memorindaj momentoj okazis en ĉi tiu

Ett ganska nytt sätt att ta sig över älven har under senare år visat sig rulla på Göteborgs gator och även flyta på älven. Göteborgarna har en aldrig sinande vilja att ta sig över älven till Hisingen. Ideligen byggs det nya förbindelser och inte bara det, man bygger även öar för att komma närmare den förtrollande ön med så mycket ärevördig historia på nacken.



preĝejo... baptoj, diservoj, geedziĝoj kaj entombigoj, kaj vi sentas vin pia kiam vi staras ĉe la preĝeja pordego kaj rigardas malproksimen trans la maron.



La kapelo de Sankta Birgitta vidata de Hisingen.

Sankta Birgittas kapell från Hisingssidan.

Sätten äro många, broar, tunnlar, färjor men ingen linbana som var planerat men lades ner. Den blev, så att säga, hängande i luften ...

Sankta Birgittas kapell, är en vacker kyrka som ligger på en höjd nära älven. I denna kyrka har många förbindelser träffats om att dela livet i vått och torrt.

I alla fall höjer den sig mäktigt över båtlivets och restaurangernas verksamheter och andra händelser som pulserar i det gamla industriområdet.

En stilla promenad i området lockar kanske till högre tankar. Många högtider och minnesvärda stunder har skett i denna kyrka... dop, gudstjänster, giftermål och begravningar och man känner sig andaktsfull när man står uppe vid kyrkporten och tittar långt utöver havet.



La malnova Carnegie-kvartalo kun Älvsborgsbron en la fono.

Det gamla Carnegieområdet med Älvsborgsbron i bakgrunden.

Haltigu la tempon por momento...

Stanna tiden en liten stund...

de Helio Duarte



Fotou.nr:0:2866

Tillhör Göteborgs Stadsmuseum

De la stalo de Bjurslätt, bieno kiu vidis homojn veni kaj foriri tra la jaroj, estas foto el 1908 kiu frostigas la tempon por momento. Ĉirkaŭ la bieno, la herbejoj etendiĝas, verdaj kaj vivaj. La malnovaj lignaj konstruaĵoj staras tie, eluzitaj de vento kaj vetero sed ankoraŭ fortikaj.

En la bildo vi povas vidi la filinon de S. A. Hedlund, Elin Hedlund, naskitan en 1856. Apud ŝi estas sia filino Dagmar Pegelow, naskita en 1904. Ili estas meze de simpla tasko, manĝigi la kokinojn. Ĉiutaga momento, kiu eble ne signifis multon tiutempe, sed kiu retrospektive multe diras pri kia estis la vivo en la kamparo tiutempe.

Sed la historio de la loko komenciĝas multe pli frue ol tio. Longe antaŭ ol Elin kaj Dagmar transiris la korton, generacioj jam vivis kaj laboris sur la ĉirkaŭa tero. Kaj eĉ pli

På Bjurslätt's ladugård, en gård som genom åren sett människor komma och gå, finns ett fotografi från 1908 som stannar tiden en liten stund. Runt gården breder ängarna ut sig, gröna och levande. De gamla träbyggnaderna står där, slitna av vind och väder men fortfarande stadiga.

På bilden ser man S. A. Hedlunds dotter Elin Hedlund, född 1856. Vid hennes sida finns dottern Dagmar Pegelow, född 1904. De är mitt i en enkel syssla, de matar hönsen. En sådan där vardaglig stund som kanske inte betydde mycket just då, men som i efterhand säger mycket om hur livet såg ut på landet vid den tiden.

Men platsens historia börjar långt tidigare än så. Långt innan Elin och Dagmar gick över gårdsplanen hade generationer levt och arbetat på markerna runt omkring. Och ännu

malproksime, la tuta pejzaĝo aspektis alimaniere.

Kiam la merkato estis plej aktiva en Gotenburgo, farmistoj el Hisingen venis en la urbon kun siaj varoj. Ili estis konata vidaĵo ĉe la merkatoj. Tie, laŭlonge de la rivero, estis Backa. La areo ofte nomiĝis la Ĝardeno de Hisingen. La nomo diris ion pri la grundo tie, fekunda kaj riĉa, kie kreskis rikoltoj kaj homoj vivis proksime al la naturo.

Samtempe, Hisingen ne ĉiam estis la granda insulo, kiun ni konas hodiaŭ.

Dum la ŝtonepoko kaj bronzepoko, la strandnivelo estis signife pli alta ol ĝi estas hodiaŭ. La pejzaĝo estis dividita en plurajn insulojn. Kie Göteborg estas hodiaŭ, ekzistis insularo. La rivero Kvillebäcken funkciis kiel natura akvovojo inter la riveroj "Göta" kaj "Nordre". Homoj jam vivis sur la ĉirkaŭaj montetoj tiutempe. Ili ekloĝis kie la tero estis seka kaj sekura.

Multaj el la lokoj, kie iam loĝis ŝtonepokaj homoj, nun estas subakvaj. La spuroj restas, sed la pejzaĝo ŝanĝiĝis dum la jarmiloj.

Tamen io restas. La fotoj, la rakontoj kaj la memoroj de la homoj, kiuj vivis siajn vivojn ĉi tie.

La bildo el la stalo Bjurslätt kaptas nur momenton. Elin kaj la malgranda Dagmar nutras la kokinojn en ordinara tago en 1908. Sed malantaŭ la simpla sceno estas multe pli longa rakonto. Rakonto pri Hisingen, pri la tero, la akvo kaj la homoj, kiuj faris la lokon sia hejmo denove kaj denove.

La aŭtoro Viktor Rydberg laboris por S. A. Hedlund ĉe la gazeto Göteborgs Handels- och Sjöfartstidning.



La bieno Bjurslätt estis la somerhejmo de la Hedlund-familio, kie Rydberg ĝuis pasigante sian liberan tempon.

Victor Rydberg
1828–1895.

längre tillbaka såg hela landskapet annorlunda ut.

När torghandeln en gång var som livligast i Göteborg kom bönder från Hisingen in till staden med sina varor. De var en välbekant syn på marknaderna. Där, längs älven, låg Backa. Området kallades ofta Hisingens trädgård. Namnet berättade något om jorden där, bördig och rik, där grödor växte och människor levde nära naturen.

Samtidigt var Hisingen inte alltid den stora ö vi känner i dag.

Under stenåldern och bronsåldern låg strandlinjen betydligt högre än nu. Landskapet var uppdelat i flera öar. Där Göteborg i dag breder ut sig fanns då en skärgård. Kvillebäcken fungerade som en naturlig vattenväg mellan Göta älv och Nordre älv. På höjderna runt omkring bodde människor redan då. De slog sig ner där marken låg torr och trygg.

Många av de platser där stenålderns människor en gång levde ligger i dag under vattenytan. Spåren finns kvar, men landskapet har förändrats genom årtusendena.

Ändå finns något som består. Fotografierna, berättelserna och minnena av människorna som levde sina liv här.

Bilden från Bjurslätt's ladugård fångar bara ett ögonblick. Elin och lilla Dagmar som matar hönsen en vanlig dag år 1908. Men bakom den enkla scenen finns en mycket längre historia. En historia om Hisingen, om jorden, vattnet och människorna som gång på gång har gjort platsen till sitt hem.

Författaren Viktor Rydberg arbetade hos S. A. Hedlund på Göteborgs Handels- och Sjöfartstidning.

Bjurslätt's gård var familjen Hedlunds sommarställe där Rydberg gärna tillbringade ledig tid.



La fascino de la insulo Ringön

*Mia nomo estas **Fredrik Viberg** kaj mi estas komencanto en Esperanto. La teksto estas tradukita preskaŭ tute per Google. Ĝuu.*

Delonge min fascinas Ringön. Ĉi tiu malgranda, stranga loko komenciĝas de la ponto Hisingsbron je unu flanko. Ĝi estas malnova industria distrikto, kiu en siaj malnovaj domoj kaj konstruaĵoj povas cedi al pli niĉaj intereso. Aldone al la pli oftaj ĉiutagaj aktivecoj, kiel aŭtolaborejoj, rubtraktadejoj, padeltenishaloj kaj besthospitaloj ktp, vespere Ringön ofertas lokon, kie homoj interesitaj pri biero, muziko, arto kaj noktoklubaj rave-festoj povas kunveni.

Mi mem loĝis sur Ringön kaj ĉar ĝi estas plejparte dezerta vespere, oni foje povas aŭdi basan sonon, kiu eĥas tra Ringö ĝis en la fruajn matenhorojn. Kaj krom la taga kaj nokta vivo, por mi, plej granda allogaĵo de la insulo estas la proksimeco al la akvo. Ĉar tie ankoraŭ estas ŝipkonstruejoj kaj boata vivo. La ŝipkonstruejo Ringövarvet, iama Marinskroten, prizorgas boatojn, kiuj plenumis sian taskon, sed ĝi estas ankaŭ loko, kie mi renovigis mian boaton dum ĉirkaŭ tri jaroj.

La ö (insulo) en la nomo estas ne nura hazardo. En la pasinteco ĝi estis iomete insulo. Tie boatoj povis renkonti trajnojn por vartransporto. Oni dragis kanalon, kiu apartigis la tutan lokon de la resto de Hisingen. Estas sufiĉe amuze vidi mapojn pri la malnova Gotenburgo. Laŭ mia kompreno,



Artaĵo en strato de Ringön.

la kanalo iris de la nuna aŭtotunelo Marieholm ĝis la urboparto Kville. Malfacile imagi, kiel ĝi aspektis tiam, ĉar preskaŭ neniu videbla spuro restas. Sed spuroj de la fervojaj reloj ankoraŭ restas.

La ŝajne kruda surfaco de Ringön eble igos homojn turni la rigardon en alian direkton, oni eble pensas, ke ĝi estas neuzita potencialo, ĉar la loko estas tiel proksima al la urbo. Sed mi opinias, ke ni devas konservi Ringön kaj eble eĉ pli emfazi la unikecon de la areo. Ĝian industrian, rustikan estetikon, muzikan scenejon kaj proksimecon al la maro. Loko, kie homoj kun specialaj intereso povas kolektiĝi proksime al la urbo. Espereble povos esti pli da malgrandaj entreprenoj aŭ interesaj asocioj, kiuj povas antaŭenigi la disvolviĝon de la areo.



Malnova bildo de la kanalo kun detalo dekstre.

Venis letero de Manuela Blanco

*al Ingegerd kaj al la gotenburgaj klubanoj,
kiujn Manuela renkontis en marto. Vidu
artikolon en Ora Ĵurnalo numero 93!*

Kara prezidantino, karaj geklubanoj de la
Gotenburga Esperanto-Klubo,

Kun granda honoro mi legis en Ora Ĵurnalo la
artikolon kaj ĝuis la riĉan fotoalbumon pri
mia vizito ĉe vi. Rimarki kiel bele vi
rememoras tiujn momentojn kaj kiel vive kaj
agrable la etoso de nia renkontiĝo aperas per
viaj vortoj kaj bildoj, estas por mi tre valora
donaco kiu ĝojigas mian koron.

Kiel mi rakontis, Ora Ĵurnalo entenas por mi
memoraĵojn de mia unua kontakto kun
Esperanto en Svedio, kiam mia kara amiko
Bertil Nilsson, tute fiera, prezentis al mi la
revuon kiel "norda stelo" dulingva!

Mi kore dankas la teamon pro la bela artikolo
kaj pro la tuta zorgo, kiun vi dediĉis al mia
vizito.

Mi volas danki vin ĉiujn pro via afableco, via
malferma akcepto, pro via helpo kaj pro la
belaj, ofte tre amuzaj momentoj kiujn ni
pasigis kune. Por mi estis granda plezuro
sperti la esperantan etoson de via klubo, kie
oni sentas amikecon kaj ankaŭ la eblecon
paroli/paroligi Esperanton.



Christin kaj Manuela. (Manuela fotis.)

Speciale kaj senfine dankeme mi estas al la
prezidantino kaj ŝia familio Granat, kiuj tiel
varme, zorgeme akceptis min (eĉ en la
malfrua horo en kiu mi alteriĝis), kaj helpis
dum mia restado. Kaj kiom diri pri Christin...
kor-florbukedo ŝi estas.

Via gastamo restas por mi tre kara ekzemplo
de la kulturaj kutimoj de nia lingvo.

La tagoj en Gotenburgo restas kiel belaj
momentoj, komuna interesiĝo pri naturo,
kulturo kaj la internacia lingvo. Estas ĉiam
mirinde konstati, ke per Esperanto oni tuj
sentas sin hejme inter amikoj.

Mi esperas, ke niaj vojoj denove baldaŭ
kruciĝos – ĉu en Gotenburgo, ĉu aliloke.

Kun varmaj salutoj kaj granda dankemo,

Amike, Manuela Blanco

Nova kontribuanto al Ora Ĵurnalo, Jindřiška Drahotová, Ĉeĥio

Ŝi mem skribas, sed ankaŭ prenas artikolojn el diversaj landoj.
Sekvas jenaj tekstoj el ŝiaj **Legajoj XVII**:

Mateno, kiu komenciĝas kun papilio

Kanto de malespera serĉanto

Praavino rakontas

Kiam iu demandas min

Estu feliĉa



(Bildo farita de Helga Plotnes.)

Mateno, kiu komenciĝas kun papilio

El eta ovo malpli ol milimetron diametra, eta nigra larvo eloviĝas, ŝanĝiĝas en verdan larvon, ŝanĝiĝas en krizalidon, kaj el la krizalido 3 centimetrojn longa, naskiĝas bela papilio. En la eta krizalido, kaŝitaj grandaj flugiloj, eĉ kun granda ventro. Kaj ĝi sekigas kaj fortigas la flugilojn.

Daŭras ĉirkaŭ du semajnojn, por ke la ovo fariĝu papilio. Dum ĉi tiu tempo, ĝi manĝas nur 10 mandarinajn foliojn. Ĉu en ili estas "nutraĵo", kiu kaŭzas tian transformon? De krizalido ĝis papiliĝo ĝi simple atendas sen manĝado.

Ĉu tempo estas nutraĵo por matureco? Tio estas vere mistera.

Matene, en mia ĉambro mi trovas papilion fluganta. – Venu sur mian manon! Kaj ĝi venas al mia fingro, kaj fermas kaj malfermas flugilojn. – Mi faros foton, mi diras. Mi fotas ĝin proksime. Kio aperas en la fotoj, tio estas alia mistera mondo. Nigraj okuloj, spirala



buŝo, ses maldikaj kruroj. Ornamas la silkaŝimilaj flugiloj ĉielon. Delikataj koloroj. – Ĉu vi estas preta ekvojaĝi? Ĝi signalas per svingoj de la flugiloj, Jen! – Vi forflugu en la vastan mondon! Mi milde igas la papilion flugi en la ĉielon. – Al la blua ĉielo, flugu!

Mia nova, esperplena mateno komenciĝas, kun la novnaskita papilio.

La 16an de septembro 2025, **Hori Jasuo**

Kanto de malespera serĉanto

tradukis Jindřiška Drahotová

Kien mi tion metis?
Kie ĝi povas esti?
Kien mi tion kaŝis
en mia malgranda apartament'?

Jen, mi trovis multajn aĵojn,
kiujn mi serĉis antaŭ jar',
sed tion, kion mi nun vane serĉas,
nur dio min helpi povas.

Ĉu ĝi estas super ŝranko?
Eble en tirkestoj?
Ĉu en tiu granda poto?
Ĉu ĝi pendas en kurtenoj?

Kien mi tion metis?
Kie ĝi povas esti?
Kien mi tion kaŝis
en mia eta apartament'.

La plej gravaj ne estas aĵoj, sed momentoj.

Humoro estas la plej honora maniero esprimi malĝojon!!!!



Praavino rakontas

de Jindřiška Drahotová



Iam vespere, kiam estis tempo dormi, venis avino kiel kutime al nepeto en lian ĉambron legi fabelon. Sed en tiu vespero la nepo ne volis fabelon, li volis babili. Tio ne estis ofte kaj la avino ĝoje diris: "Mi propre ne estas via avino, mi estas via praavino kaj vi estas mia pranepo."

"Vi estas praavino?" miris pranepo.

"Mi estas avino de via panjo. Via avino estas mia filino."

La knabo metis la elektronikaĵon sur tableton kaj ektenis manon de sia praavino kaj kun intereso atendis rakontadon. Kaj avinjo komencis: "Mi naskiĝis plifruue ol televidiloj, policaĵoj, kreditkartoĵoj, kopiiloj, klimatiziloj, laseraj radioj, saĝaj telefonoj, eĉ lavmaŝinojn ni ne havis, kaj tolaĵojn ni pendis sur ŝnurojn ekstere por sekigi.

Mi edziniĝis al via praavo kaj ni vivis kune kaj en ĉiu familio estis paĉjo kaj panjo. Viroj ne portis en oreloj ornamaĵojn. Tatuĵojn havis nur prizonuloj kaj maristoj. Ĝis mia dekokjaraĝo mi alparoladis ĉiun viron "sinjoro" kaj virinon "sinjorino" aŭ "fraŭlino". Sur ŝtuparo virinoj ĉiam ĝuis lokon ĉe teniloj kaj en lifton envenadis ĉiam la unuaj. Viroj malmetadis ĉapelon dum saluto kaj ankaŭ kiam ili envenis ĉambron. Viroj malfermadis pordon kaj helpadis al virinoj surmeti mantelon.

Ni havis bonajn rilatojn kun familianoj kaj ni vizitadis ofte eĉ malpli proksimajn gekuzojn. Telefonoj estis en budoj surstrate kaj en poŝtoŝtupoj kaj ni funkciigis ilin per moneroj. Ni havis radioaparaton "sur drato" kun unu programo. Iuj lertaj homoj kapablis mem konstrui radioaparaton por kapti eksterlandajn programojn.

Mia patrino ne posedis glaciŝrankon nek lavmaŝinon, varman akvon ŝi varmigis en potego kaj tolaĵon ŝi lavis mane en ligna ujejo. Kiam mi estis matura kaj edzinigita, dudek jarojn post la milito, mi jam povis aĉeti lavmaŝinon. Nur poste aperis televidiloj kun malgranda ekrano.

Ĉiun tagon ni devis en horloĝoj streĉi risorton kaj kontroli, ĉu vekilo estas startita. Ne estis bankomatoj, sendrataj telefonoj, komputoroj, elektronikaj ludiloj, mikroondaj fornoj, eĉ elektraj fridujoj kaj lavmaŝinoj. Tolaĵojn ni somere blankigis sur herbejo ĉe rivero kaj tapiŝojn ni purigis per batiloj ekstere.

Se ni tro petolis, gepatroj avertis nin infanojn, ke per tiu ĉi batilo ili punos nin. Voje el leciono pri violono mi aĉetadis kun amikino kornbulkon je 30 heleroj kaj en papero acidan brasikon je 20 heleroj. Unu krono havis 100 helerojn.

Bonbonojn oni vendis laŭ pezo en papera saketo. Kafajn grejnojn aĉetadis mia patrino kaj hejme ni muelis ilin mane per muelilo."

La nepo, kiu ĝis nun atente aŭskultis, penseme diris: "Sed avinjo, ĉu vi estas tricentjara?"

"Ne, ne karulo, mi aĝas nur 87 jarojn," diris kun rideto avino. "Ĉio, pri kio mi rakontis al vi, estas vero vereca. Mi konas multajn okupojn, kiujn vi neniam faros. Pri tio mi estas iom majgaja."

Kaj avino vidante, ke okuloj de la nepo fermiĝis, mallumigis lampeton kaj senbrue foriris ankaŭ dormi.

Kiam iu demandas min

”Kiam iu demandas min, kiel karakterizi Esperanton, mi respondas, ke ĝi estas amo inter logiko, beleco kaj simpleco. Ankaŭ hobia kaj bona antaŭzorgo kontraŭ la Alzheimer-demenco.

Kaj kiam iu demandas, kiuj estas la esperantistoj, mi respondas, ke ili estas amantoj de logiko, beleco kaj simpleco, kiuj ne scias, kio estas demenco.”



– **Max Kaŝparŭ** grekkatolika pastro, psikiatro, pedagogo, esperantisto, ĉeĥo.



Estu feliĉa!



Ekzistas en jaro nur du tagoj, kiam vi povas nenion fari, spite vi volus: unu estas la hieraŭo, la dua la morgaŭo. Tiam hodiaŭo estas la plej taŭga tago ami, agi, vivi.

Sep etaĵoj, kiuj faras homojn feliĉaj

Iu, mi ne scias kiu, perdis ie tiun ĉi liston. Mi trovis ĝin kaj ĝin mi trovis taŭga por traduko por miaj esperantaj amikoj, esperante, ke ĝi povas eble iom pozitive feliĉigi ilin. La listo portis surskribon: SEP ETAĴOJ, KIUJ FARAS HOMOJN FELIĈAJ. Tiel eĉ vi povas tion legi, eble praktiki ...

1. Feliĉaj homoj ĝuas ordinarajn momentojn

Antaŭ nelonga tempo mi rigardis tra fenestro infanojn, kiuj saltas sur trampolino. Estis bele vidi ilian ĝojon. Se vi konos krei en vi mem dankemon je tiaj ĝuoj, via vivo neniam estos vaka.

2. Feliĉaj homoj serĉadas komunumon kaj planas kunvenojn

Kelkaj el miaj amikoj instruis min per ilia ekzemplo: anstataŭ paroloj – estus bone kunveni, efektive ion proponi, planon kaj realigi ĝin. Tiaj amikoj estas plej valoraj.

Ankaŭ vi povas esti tiu, kiu alportos al via komununo ĝojon.

3. Feliĉaj homoj vivas kviete kaj tute ne komparas sin kun aliaj

Iaj homoj posedas sanan ambicion, aliaj homoj neniam estas kontentaj. Feliĉaj kaj sukcesaj homoj, kiujn mi konas, havas en si forton plibonigi aferojn, ili estas kontentaj kun si mem, kiel ili ludus sian propran rolon en sia propra teatraĵo kaj tute neglektas pri ludoj de aliaj.

4. Feliĉaj homoj tenas promesojn, kiujn ili donis al si mem

Unu el miaj la plej bonaj decidoj de mia vivo mi faris dum lerneja tempo, kiam mi aliĝis al teamo de kunkuremaj knaboj. La teamo estis konkurema kaj mi iom post iom kapablis kuri 110 kilometrojn semajne. Mi lernis por ĉiam plenumi promesojn.

5. Feliĉaj homoj plenumas planojn ĝis fino

Rutino de feliĉa homo povas esti, ke li lasas sian vivon senzorge pasi. Sed mia sperto estas malsama. Feliĉaj homoj kondutas amuze, sed fakte estas seriozaj, pripensemaj. Kreas planojn kaj ankaŭ plenumas ilin. Tiu

eco fermas ilian vivstrukturon kaj sencon kaj ili atingas siajn celojn.

6. Feliĉaj homoj perceptas sencojn de aliaj homoj


Estas bone kondukti al homoj inde, ĉar tio estas dece, ĝuste. Tia homo estas pli simpata. La pordoj plifacile malfermas. Se vi estas empatia, vi ricevas okazon por reveno de viaj bonaj aferoj.

La plej feliĉaj homoj en la mondo – Världens lyckligaste folk

La Monda Raporto pri Feliĉo estas publikigita ĉiujare de la *Reto de Solvoj por Daŭripova Evoluigo de UN*. Ĝi estas enketo en kiu homoj taksas sian sperton pri feliĉo.

En 2026, la listo aspektas jene:

1. Finnlando
2. Islando
3. Danio
4. Kostariko
5. Svedio
6. Norvegio
7. Nederlando
8. Israelo
9. Luksemburgo
10. Svislando



Mi scivolas kiel Kostariko povus iri de la 20a ĝis la kvara loko en nur unu jaro.

Kostariko kaj Israelo estas la solaj ne-eŭropaj nacioj en la listo. Devas esti pli da feliĉaj nacioj ankaŭ ekster Eŭropo, ĉu ne? Oni diras, ke finnoj estas kontentaj pri tio, kion ili havas, kondiĉe ke iliaj najbaroj ne vivas pli bone.

Vere, aŭ???

/Siv

7. Feliĉaj homoj gimnastikas

Mi konas iuspecajn homojn, kiuj vivas belan vivon, spite ili ne gimnastikas. Sed regula movo estas bona investaĵo por estonto, kiun vi povas por vi mem fari. Dum ekzercado povas multo da problemoj elvaporigi, prefere gimnastiku regule.

el *Legajoj*, eldonita de **Jindřiška Drahotová**

World Happiness report publiceras ĉiujare av *FNs nätverk för lösningar för hållbar utveckling*, en undersökning, där befolkningar skattat sin upplevelse av lycka.

År 2026 ser listan ut så här:

1. Finland
2. Island
3. Danmark
4. Costa Rica
5. Sverige
6. Norge
7. Nederländerna
8. Israel
9. Luxemburg
10. Schweiz

Jag frågar mig hur Costa Rica på bara ett år kunde komma från plats 20 till plats fyra.

Costa Rica och Israel är de enda utomeuropeiska nationerna i listan. Det måste väl finnas fler lyckliga nationer också utanför Europa, eller hur? Man säger att finländare är nöjda med vad de har, så länge inte grannarna har det bättre. Sant, eller???

/Siv

Kelke da nombroj

Nombroj en amo

inteligenta viro + inteligenta virino = amafero

inteligenta viro + stulta virino = sola patrino

stulta viro + inteligenta virino = geedzeco

stulta viro + stulta virino = altaj socialaj helpopagoj

Nombroj ĉe la laboro

inteligenta estro + inteligenta dungito = profito

inteligenta estro + stulta dungito = produktiveco

stulta estro + inteligenta dungito = promocio labora kaj financa

stulta estro + stulta dungito = kromlaboro

Feliĉo

Esti feliĉa kun viro signifas kompreni lin multe kaj ami lin iomete.

Esti feliĉa kun virino signifas ami ŝin multe kaj tute ne provi kompreni ŝin.

Longviveco

Edziĝintaj viroj vivas pli longe ol fraŭloj, sed edziĝintaj viroj havas pli grandan deziron morti.

Ŝanĝiĝaj tendencoj

Virino edziniĝas al viro atendante, ke li ŝanĝiĝos, sed li ne faras tion.

Viro edziĝas al virino atendante, ke ŝi ŝanĝiĝos, kaj ŝi faras tion.

Kiel igi homojn ĉesi ĝeni vin pri geedziĝo


Maljunaj onkloj kutimis piki min en la ripojn post geedziĝfesto, dirante:

“Nun estas via vico.”

Ili ĉesis kiam mi faris la samon al ili post la funebro.

Ĝeneralaj nombroj kaj statistikoj

Virino maltrankviliĝas pri la estonteco ĝis ŝi edziniĝos.



Viro ne maltrankviliĝas pri la estonteco ĝis li edziĝos.

Sukcesa viro estas tiu, kiu povas gajni pli da mono ol lia edzino povas elspezi.

Sukcesa virino estas tiu, kiu trovas tian viron.

Gravas en la butikoj

Viro pagas 200 € por aĵo kiu kostas 100 €, kiam li bezonas ĝin.

Virino pagas 100 € por aĵo kiu kostas 200 €, sed neniam bezonas ĝin.

Debata praktiko

En ĉiu disputo, la virino havas la lastan vorton.

Ĉiu vorto, kiun viro diras post tio, estas la komenco de nova disputo.

Sendu ĉi tion al inteligenta virino, kiu ŝatas ridi kaj al inteligenta viro, kiu scias kiel agi pri ĝi.

Elektis kaj esperantigis Josef Kříž

Ŝercoj por OĴ de Josef Kříž

Kiel oni ekscias sekson de muŝoj?

Edzino eniris kuirejon kaj vidas sian edzon kun muŝbatilo en la mano kaj demandas:

“Kion vi faras?”

“Vi ja vidas, mi mortigas muŝojn.”

“Kaj kiom da muŝoj vi jam mortigis?”

“Tri virmuŝojn kaj du muŝinojn.”



“Kiel vi scias ilian sekson?”

“Tute simple: tri sidis sur Bierglaso kaj du sur telefonaparato.”

En muzeo

Muzea gvidisto informas grupon da vizitantoj:



”Jen, vi vidas brontosauran skeleton, kiu aĝas 2 milionojn da jaroj, 6 monatojn kaj tri tagojn.”

Unu el la vizitantoj tuj reagis: ”Tio estas nekredeble! Kiel eblas, ke vi tiel precize scias la aĝon de la skeleto?”

”Tio estas tre simple, kiam mi fariĝis gvidisto, ili diris al mi, ke la skeleto aĝas 2 milionojn da jaroj ... kaj mi estas ĉi tie jam de 6 monatoj kaj tri tagoj.”

Disŝiras la terglobon ŝtata lim’

de Tatjana Auderskaja, Ukrainio

Disŝiras la terglobon ŝtata lim’,
Disigas homojn la lingvar’ abunda.
El nekompreno iĝas honta tim’,
Aroge regas la malam’ profunda.

La antaŭbabilona Paradiz’
Reveni povas, se ni nur deziros.
Kaj preterpasos nin terura kriz’,
Se ni al la frateco kune iros.

Ligiĝas ĉiuj kontinentoj
Per ĉen’ de l’ homoj laboremaj.
Boncelas la eksperimentoj
De esperantoj bonfaremaj.



Bildo de Pixabay

Similas al matematik’
La lingv’, por ĉiu unusola.
Ĝi kiel Sun’, sen artifik’,
Al ĉiu estas benevola.

Jam tempas limojn pereigi,
Kaj kun la kant’ popolojn ligi!
Kiel ĉielon la Atlantoj,
Terglobon tenos Esperantoj

La telfero super Liseberg – Linbanan över Liseberg

el la Facebook-grupo **Historio de Gotenburgo** – ur Facebookgruppen **Göteborgs Historia**

La telfero super Liseberg – kapturniga komenco

de Helio Duarte

Imagu Gotenburgon en 1923. La jubilea ekspozicio ĵus malfermiĝis kaj la urbo zumas de fido al la estonteco. Homoj moviĝas inter ekspoziciaj areoj, scivolemaj, atendantaj. Kaj tie, alte super la tero, ŝvebas io, kio igas multajn halti kaj rigardi – la telfero.

Ĝi ne estis nur allogaĵo. Ĝi estis sperto. Vojaĝo en la aero, kiu ligis la amuzparkon ĉe Liseberg kun la





aliaj partoj de la ekspozicio. La gondoloj glitis super la areo kaj donis al vizitantoj vidon de ŝanĝiganta urbo. Por multaj, estis la unua fojo, ke ili vidis Gotenburgon de supre.

La telfero rapide fariĝis unu el la grandaj kulminaĵoj de la datrevena jaro. Ĝi simbolis ion novan, ion aŭdacan. Teknologian progreson, la eblecojn de la estonteco. Samtempe, estis ia nervo en la sperto. Ifoje la gondoloj haltis, kaj tiam riparistoj devis balanciĝi ekstere sur la kabloj por helpi la pasaĝerojn. Estis alia tempo. Pli kuraĝa eble, aŭ simple pli senzorga.

Sed kiel tiom da aliaj aferoj el 1923, la telfero ne restis eterne. Kiam la ekspozicio finiĝis, ĝi malaperis, sed la spuroj vivis iom da tempo. Poste novaj ideoj prenis sian lokon en la kreskanta historio de Liseberg.



Eble tial la telfero ankoraŭ fascinas. Ĝi estis tie por mallonga tempo, sed sukcesis fariĝi memoro, kiu ankoraŭ ŝvebas super Gotenburgo, kiel memorigilo pri urbo, kiu kuraĝis rigardi supren.

Linbanan över Liseberg – en svindlande början

av Helio Duarte

Tänk dig Göteborg år 1923.

Jubileumsutställningen har just öppnat och staden sjuder av framtidstro. Människor rör sig mellan utställningsområden, nyfikna, förväntansfulla. Och där, högt ovan marken, svävar något som får många att stanna upp och titta, linbanan.

Den var inte bara en attraktion. Den var en upplevelse. En färd i luften som band samman nöjesfältet på Liseberg med de övriga delarna av utställningen. Gondolerna gled fram över området och gav besökarna en vy över en stad i förändring. För många var det första gången de såg Göteborg från ovan.

Linbanan blev snabbt en av de stora höjdpunkterna under jubileumsåret. Den symboliserade något nytt, något djärvt. Teknikens framsteg, framtidens möjligheter. Samtidigt fanns det en viss nerv i upplevelsen. Ibland stannade gondolerna, och då fick reparatörer balansera ute på vajrarna för att hjälpa passagerarna. Det var en annan tid. Modigare kanske, eller bara mer obekymrad.

Men som så mycket annat från 1923 blev linbanan inte kvar för alltid. När utställningen var över försvann den, men spåren levde vidare en tid. Sedan tog nya idéer plats i Lisebergs växande historia.

Kanske är det just därför linbanan fortfarande fascinerar. Den fanns där under en kort stund, men hann bli ett minne som svävar kvar över Göteborg, som en påminnelse om en stad som vågade blicka uppåt.

P. S:

Linbana mellan Göteborg och Hisingen har varit aktuellt nu på senare år men det slutade med att man valde tunnlar istället. I alla fall kan man hoppas att vi i framtiden

P. S:

Telfero inter Gotenburgo kaj Hisingen estis en la tagordo en la lastaj jaroj, sed tuneloj estis elektitaj anstataŭe. Almenaŭ ni povas esperi, ke estonte ni povos vicumi por ekskurso trans la riveron.

Gloron al la jubileo de 1923!

Ingegerd Granat

kan få ställa oss i en kö för en tur över älven.

Ära vare jubileet 1923! /Ingegerd Granat



Projekto Esperanĉa Popokabaka



Elizabeth Nelly sendita de Ronald Schindler, Esperanto Societo de Berlino, ELBB.

Dum tre longa tempo nia lando, Demokratia Respubliko Kongo, suferas pro grava kaj longa milito en la orienta parto de la lando. Sed tio ne sufiĉas: aperis ankaŭ nova grupo de banditoj – ĉefe junuloj manipolataj de politikistoj – kiuj ĉikanas la loĝantaron de la provinco Kwango, precipe en la teritorio de Popokabaka.

Per ĉi tiu artikolo mi deziras prezenti al vi la projekton **"Esperanĉa Popokabaka"**:



Temas pri projekto sociala, kultura, humanitara kaj bonfarada, celanta subteni la vundeblajn grupojn en la teritorio de Popokabaka, DR Kongo: maljunuloj, handikapuloj, subnutrituloj, blinduloj, vidvinoj, orfoj kaj forlasitaj knabinoj. Por atingi la celojn de la projekto, ni petas la helpon de ĉiuj legantoj – materiale aŭ finance.

1. Subteno materia aŭ natura

En tiu parto de la lando homoj vivas en severa maljusteco ekde la kolonia belga epoko ĝis hodiaŭ. La plejmulto vivtenas sin per agrikulturo, bredado kaj fiŝkaptado, dum la ŝtato ne provizas la necesajn servojn. Tie troviĝas nur kelkaj malnovaj katolikaj konstruaĵoj; mankas laborejoj, fabrikoj, hoteloj, restoracioj aŭ aliaj fontoj de laboro.

Tial multaj preferas elmigri al Kinŝaso, la ĉefurbo. Sed la vilaĝanoj bezonas rimedojn por vivi kaj labori en sia propra komunumo.

La menciitaj grupoj suferas gravan diskriminacion en la tuta regiono. Ili bezonas manĝaĵojn, vestaĵojn, edukon kaj laborŝancojn, ĉar ĉio ĉi estas limigita pro la manko de ŝtataj infrastrukturoj. Pro tio ni alvokas geinvestantojn pripensi kaj subteni la projekton "Esperanĉa Popokabaka", kiu povas doni fruktojn al la tuta regiono kaj esti realigata en kunlaboro kun la loka diocezo.

2. Subteno financa

La projekto celas konstrui kulturen centron kaj maljunulejon, kie Esperanto kaj aliaj fremdaj lingvoj estos instruataj. Por realigiti tion, necesas efika transporto de

konstrumaterialoj el Kinŝaso ĝis Popokabaka; tial la projekto bezonas grandan kamionon (ekz. MAN) aŭ malgrandan teren-veturilon kiel Jeep4x4.

Jen gravaj kampoj, en kiuj vi povas investi:

Agrikulturo

Por helpi la kamparanojn trovi laboron kaj tiel batali kontraŭ malsato, malnutrado kaj malstabileco en la regiono.

Kultura centro

Por eduki kaj valorigi junulojn kaj knabinojn per diversaj metioj.

Ĉiuj instruistoj – esperantistoj kaj neesperantistoj – estos bonvenaj en Popokabaka por kontribui al la instrua programo.

Ni jam posedas la terenon por konstruado, sed mankas la rimedoj por komenci. La loka komunumo jam montras sian subtenon per konkretaj kontribuoj, kaj la loĝantoj tre deziras internacian kunlaboron.

Akvopurigo / trinkakva fabriko

Nun la loĝantoj trinkas malpuran akvon. Fabriko por produkti puran trinkakvon estus tre utila ne nur al Popokabaka, sed ankaŭ al la tuta provinco Kwango kaj eĉ al Kinŝaso.

Apoteko

En la teritorio mankas apoteko; multaj homoj mortas sen ĝusta diagnozo aŭ kuracado.

La projekto bezonas starigi socialan apotekon por helpi la vundeblajn homojn kaj la tutan ĉirkaŭaĵon.

Popokabaka kiel natura kaj turisma regiono

Popokabaka estas bela loko por vivi en trankvilo kun la naturo; ĝi taŭgas por loka, regiona, kampara, nacia kaj internacia turismo.

La rivero Kwango kun la riveretoj Lwayi, Ngowa, Wambakaj aliaj ofertas riĉan fiŝkaptadon kaj ebligas navigadon per boatoj.

La tuta provinco enhavas gravajn mineralajn riĉaĵojn, kiuj ĝis nun restas neesploritaj kaj neekspluatataj, ĉar mankas firmaoj por investi tie.

Alvoko al la mondo esperantista kaj al komercistoj

Karaj geesperantistoj kaj geentreprenistoj en la tuta mondo, ni invitas vin rigardi kiel vi povas subteni, kunlabori aŭ investi en la projekto "Esperança Popokabaka" en DR Kongo.

Via materia kaj financa subteno havos gravan influon sur la tuta regiono, kaj Esperanto – kiel lingvo de amikeco – povos disvastiĝi kaj firmiĝi tie. La projekto malfermos la pordon por ke esperantistoj el diversaj landoj venu sperti la belecon kaj freŝecon de la natura medio de Popokabaka. Popokabaka troviĝas en la sud-okcidenta parto de DR Kongo, apud Angolo.

Kiel subteni

Gekaraj, ne hezitu sendi viajn donacojn: vestaĵojn, ŝuojn, littukojn por maljunuloj, sekajn manĝaĵojn.

(En Kinŝaso, la ĉefurbo, ni ankaŭ povas aĉeti manĝaĵojn surloke.)

Bonvolu viziti nian paĝon:

"Projet Esperança Popokabaka" (Facebook)

NB: Por sendi pakaĵojn al Kongo ni pagas maran transporton; unu kartono ĝis 50 kg nun kostas 95 eŭrojn.

IBAN: BE25 7330 6941 8482

BIC: KREDBEBB

PayPal: nelly.masemi3@gmail.com

Mencio: "Subteno por Popokabaka".

El Belgio ni sendas niajn plej sincerajn dankojn al ĉiuj nunaj kaj estontaj subtenantoj kaj kunlaborantoj.

S-ino Elizabet Nelly MASEMI MBEMBI.
Iniciatinto kaj Gvidantino de la Projekto "P.E.P."

Pli multajn informojn vi trovas en la retejo de ELBB, inter alie ankaŭ nian kalendaron pri niaj regulaj aranĝoj (Berlin: Katzbachstr. 25, Mierendorffplatz, Trautenaustr, ...)

<https://esperanto.berlin>

Amike, Ronaldo

Atentigojn, petojn kaj proponojn por artikoloj bv. sendi al RonaldSchindler[ĉe]web. de.

Ankaŭ, se vi havas proponon, al kiu ni sendu la informon, bv. skribi al mi.

Kial Gronlando "apartenas" al Danio?

el NORVEGA ESPERANTISTO 1/2026

Franca esperantisto demandas, nome de multaj samlandanoj:

Kial Gronlando apartenas al Danio? Trafa demando! Efektive ĝi devus aparteni al Norvegio!

La jena klarigo estas bone konata de norvegoj, kiuj lernas tion en mezlernejo. Do por ili temas pri refreŝigo de lernejaj konoj. Por eksterlandanoj, tio estos kompreneble io nova.

La fakto ke Gronlando estas dana teritorio estas rezulto de la historio kun granda H, kaj tri nomojn oni devas mencii: **Eirik Raude** (ĉ. 940–1000), **Margrete Valdemarsdatter** (1353–1412) kaj **Jean-Baptiste Bernadotte** (1763–1844).

En tiu ĉi artikolo mi ne pritraktos la alian popolon (inuitoj) kiuj loĝas sur Gronlando de pluraj jarcentoj. Ili loĝis pli norde ol la skandinavo.

Islandano Eirik Raude

Laŭ islanda sagao verkita en la 12-a jarcento, Eirik Raude estis tiu, kiu malkovris Gronlandon kaj tie instaligis en 982. Li naskiĝis en sudokcidenta Norvegio (Rogaland) kaj de tie migris kun sia patro al Islando.

Tiutempe Islando estis loĝata de norvegoj kaj dependis politike, religie kaj kulture de la norvega ĉeftero. Eirik Raude esploris la sudokcidentan parton de Gronlando, kaj trovis ke tie oni bone povis vivi pro verdaj

paŝtejoj kaj milda klimato. La vorto Gronlando fakte signifas la "verda lando".

Dum pluraj jarcentoj norvegoj vivtenis sin tie per ŝafa bredado kaj fiŝkaptado. La kolonio prosperis kaj arkeologoj trovis spurojn de 290 domoj. Oni ankaŭ scias ke estis 16 preĝejoj, kaj historiistoj kalkulis ke ĝis 4000 homoj vivis dum Mez-epoko sur Gronlando.

Fine de la 14-a jarcento perdiĝis kontakto kun skandinavo sur Gronlando. Historiistoj ne scias kial, sed plej verŝajna klarigo estas klimat-ŝanĝiĝoj. Fariĝi pli malvarme kaj pli malfacile vivteni sin. Eble ankaŭ pesta epidemio malfortigis la kolonion.

Dana reĝino Margrete la 1-a

Margrete estis unu el la plej talentaj politikistoj el Skandinavio. Ŝi estis filino de dana reĝo, edziniĝis al norvega reĝo, kaj post morto de ŝia patro kaj edzo, ŝi lerte sukcesis fariĝi reĝino de Danio kaj Norvegio, kvankam ŝi teorie ne rajtis je tiuj titoloj. Ŝi ankaŭ ruze igis sin elektita reĝino de Svedio.



Ruino de Hvalsey preĝejo sur Gronlando.

En 1397 ŝi kunvokis gravulojn de la tri landoj en Kalmar (Svedio), kaj stairigis la t. n. kalmaran union kun unu sola reganto por la tri landoj.

La trilanda unio ĉesis kiam Svedio forlasis ĝin en 1523, sed la dulanda unio inter Norvegio (inkluzive de Islando, Gronlando kaj Feroaj insuloj) kaj Danio daŭris ĝis 1814.

Franca generalo Bernadotte

Meze de la napoleonaj militoj, en 1811, svedaj nobeluloj venis al Parizo proponi al generalo Bernadotte iĝi reĝo de Svedio. Kial? Ĉar Bernadotte estis lerta militisto, kaj svedoj esperis ke li povos militi kontraŭ Rusio kaj regajni Finnlandon, kiun Svedio perdis dum milito kontraŭ Rusio en 1809.

Bernadotte akceptas esti reĝo de Svedio, sed rezignas pri la freneza ideo denove militi kontraŭ Rusio.

Eblas imagi jenan dialogon inter Bernadotte kaj liaj konsilistoj:

”– Kiu lando najbaras Svedion okcidente?
demandas Bernadotte.

– Norvegio.

– Al kiu ĝi apartenas?

– Al Danio.

– Bone! Ni povas militi kontraŭ Danio kaj preni Norvegon, kiel konsola premio je Finnlando!”

Tiel fakte okazis. En januaro 1814, la pactraktato de Kiel (tiam en Danio) agnoskas ke nun Norvegio estas sveda teritorio. La pactraktato fakte mencias ke Gronlando kaj Islando restas sub la regado de Danio. Bernadotte (konata en Norvegio kiel reĝo Karl Johan) tutsimple ne interesiĝis pri iu teritorio longe for de Svedio, kaj apenaŭ defendebla kaze de milito.

Kaj jen kiel Gronlando, unue plene norvega, fariĝis dan-norvega en 1397, kaj restis post 1814 plene dana posedaĵo.

Claude Rouget

(instruisto pri historio)


Skivojaĝo en Laponio – Skidutflykt i Lappland

De **Emelie Hultman**, pastro en paroĥo Gällivare

Av Emelie Hultman, präst i Gällivare församling

La veturo tra silenta
Ĉeakĉavággi.

*Färden genom ett
knäpptyst Čeakĉavággi.*



Mallonga bildrakonto pri agrabla ekskurso dum kelkaj tagoj da sporta paŭzo. Ĝi estas sendube la plej bona maniero por sukcesi esti libera: iri ekster la telefonan kovrozonon! Ni faris malgrandan skiekskurson de Nikkaluokta ĝis Abisko, kun tranoktoj en Kebnekaise, Sälka kaj Alesjaure. Du sunaj tagoj kaj poste la tuta alia vetero la lastajn du tagojn. Sed estis vere agrable!

Nur vojaĝante tra la tago en silento kaj kun mire belaj vidaĵoj...

Liten bildberättelse om en fin tur under ett par dagars sportlov. Det är helt klart bästa sättet att lyckas vara ledig att bege sig utanför täckningszon! Vi tog en liten skidsväng från Nikkaluokta upp till Abisko, med övernattning i Kebnekaise, Sälka och Alesjaure. Två soldagar och sedan alla de andra väder de två sista dagarna. Men riktigt fint det var det! Det där att bara färdas genom dagen i tystnad och bedövande vackra vyer...

La lasta malsupreniro de la deklivo Garddenvárri al la Abiskojaure kabanoj, kie ni havis paŭzon por tagmanĝo.

Sista utförslöpan ner från Garddenvárri sluttning mot Abiskojaurestugorna där det blev lunchrast.



Vespero ĉe la sufiĉe dezerta montstacio Kebnekaise.

Kväll på ett ganska folktomt Kebnekaise fjällstation.

La sekva mateno ofertis
iom pli limigitan vidon...
Sed kutime funkcias se vi
sekvas la krucon!

*Morgonen efter bjöd på
lite mer begränsad sikt...
Men det brukar lösa sig
om man följer korset!*



David Larsson kaj Emelie Hultman.

Noto de la redaktistoj:

Varma saluto al la du aventuristoj en norda Svedio, ke ili permesis al ni sekvi viajn vojaĝojn. Ĉiufoje same ekscite!

Anteckning från redaktionen:

En varm hälsning till de båda äventyrarna i norra Sverige för att vi får följa era turer. Lika spännande varje gång!



Kiu laboras por Esperanto, semas pacon al la mondo.

Den, som arbetar för Esperanto, sår fred på jorden.



El Legaĵoj de Jindřiška Drahotová.